

J. M. PROGIANTE

Ilustraĵoj de Heloisa M. Nakashima



BLUA SONĜO  
EN ANTVERPENO




**BLUA SONĜO  
EN ANTVERPENO**

**J. M. PROGIANTE**

Ilustraĵoj de Heloisa M. Nakashima



Antverpeno  
2020



BLUA SONĜO EN ANTVERPENO  
J. M. Progiante

Originala titolo: *O Roubo do Sonho Azul*

**Elportugaligis:** J. M. Progiante

**Ilustris:** Heloisa M. Nakashima

**Enpaĝigis:** José R. Tenório

**Eldonis:** Eldonejo Libera

*Traduko © La aŭtoro (2019)*

*Ilustraĵoj © Heloisa M. Nakashima (2019)*

*Ĉi tiu eldono © Eldonejo Libera (2020)*

Ni dankas al la aŭtoro kaj grafikistino, kiuj afable  
permesis la publikigon de ĉi tiu esperanta eldono.

Bildo sur paĝo 1 kaj filigrano en la paĝo-marĝenoj:  
<http://freepik.com>

ISBN: 978-0-244-86900-7

**E**n antaŭa libro, “La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”, mi rakontis aventuron de kvin infanoj de malsamaj kontinentoj — Andreo, Hua, Mavomo, Roza kaj Eriko —, kiuj renkontiĝis en Brazilo, en kongreso de la internacia lingvo. Tiu libro estis premiita en la Belarta Konkurso de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en la jaro 2018, dum la 103-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Lisbono, Portugalio.

Kelkaj legantoj demandis, ĉu tiuj kuraĝaj infanoj travivis alian aventuron. “Jes!” — mi respondis. “Tio okazis en aliaj landoj, kien ili iris partopreni en la universala kongreso.” Do mi decidis skribi pri ilia travivaĵo en la belga urbo Antverpeno, kie ili devis uzi sian tutan inteligentecon kaj kreemon por solvi novan misteron, ĉi foje kun helpo de la knabino Klara kaj de la juna diplomato Lufimpu. Tiel naskiĝis ĉi tiu “Blua Songô en Antverpeno”.

Bonan legadon!  
J. M. Progiante.



## TERURA MINACO


**L**ufimpu estis juna diplomato, kiu vivis en la belga urbo Antverpeno. Li laboris en konsulejo de afrika lando. Unu tagon, li estis en sia oficejo kaj alvenis mendaĵo per la poŝto. Kiam li malfermis la skatolon, li miris, ĉar en ĝi estis diamanto, kiu ŝajne havis 30 karatojn. Li surpriziĝis, ĉar tiu ŝtono estis tre simila al alia diamanto, kiu estis tie, en la monŝranko de lia ĉambro: la mondkonata Blua Songô.

Li memoris, ke en la sekvonta tago funkciulo de UN venos preni la Bluan Songon por alporti ĝin al hotelo, kie diplomatoj de multaj landoj kunsidos por trovi solvon por la problemoj kaŭzataj de ekspluatado de diamantoj en Afriko. Kaj dum la tagoj de tiu grava kunsido, UN permesos, ke la publiko vizitu la lokon kaj vidu la faman diamanton.

Subite la telefono sonoris.

— Ha lo!





— Sinjoro Lufimpu?

— Jes, estas mi.

— Mia nomo estas Karbunkolo kaj mi havas proponon. Mi donos al vi dek mil eŭrojn, se ni interŝanĝos la diamantojn. La Blua Songo restos kun mi kaj kun vi restos tiu perfekta kopio, kiun mi sendis al vi. Neniu rimarkos tion.

Lufimpu furioziĝis, kiam li aŭdis tiun fian proponon, sed antaŭ ol li reagis, la viro daŭrigis per minaca voĉo:

— Ne pensu rifuzi mian proponon. Se la Blua Songo estos alportita al la hotelo, io tre grava okazos tie, eble multaj personoj mortos kaj vi kulpigos vin dum la resto de via vivo. Kaj ne voku la policon. Se mi vidos, ke oni plifortigas la sekurecon ĉirkaŭ la hotelo, la tragedio estos eĉ pli granda. Do, ĉu konsentite?

Lufimpu estis tiel terurita, ke li apenaŭ kapablis respondi. La viraĉo perceptis tion kaj eligis laŭtan ridegon, antaŭ ol fini la konversacion per ĉi tiuj vortoj:

— Trankviliĝu, S-ro Lufimpu. Trinku glason da akvo kun sukero kaj malstreĉiĝu. Post duonhoro mi telefonos al vi denove kaj ni interkonsentos pri kiel vi liveros al mi la Bluan Songon.



## LUFIMPU HAVAS IDEON

**P**ost tiu telefonado, Lufimpu paŝadis tien kaj reen en la ĉambro. Malvarma ŝvito fluis sur lia frunto, dum li cerbumis, kiel eliri el tiu senesperiga situacio. Kompreneble li tute ne volis liveri la Bluan Songon al la bandito. “Ne!” — li pensis — “La Blua Songô apartenas al mia lando, mi ne perfidos mian popolon.”

Tamen la viro parolis klare. Se li ne cedos, multaj povos morti. Eble la ĉantaĝisto ĵetos bombon en la hotelon kaj, se tio okazus, Lufimpu sentus sin respondeca. Kion fari?

Subite li memoris, ke la funkciulo de UN, kiu venos en la sekvonta tago matene preni la diamanton, estas S-ro Ivo Simon, kiu posttagmeze prelegos en la universitato, en la kongreso de la internacia lingvo. Memorante pri tio, Lufimpu havis ideon... “Jes, kial ne? Tio povas funkcii. La risko estos granda, tamen mi bezonas provi.”





Kaj tiel, kiam la telefono resonoris, okazis inter Lufimpu kaj Karbunkolo la jena dialogo:

— Kion vi decidis, S-ro Lufimpu?

— Mi akceptas vian proponon. Morgaŭ, je la oka matene, mi transdonos al UN la falsan diamanton. Diru al mi, kiel liveri al vi la Bluan Songon kaj ricevi la monon.

— Gratulon, vi estas inteligenta. Tuj poste, je la oka kaj duono, eliru el la konsulejo kaj rigardu la alian flankon de la strato. Tie vi vidos furgonon de tollavejo. Donu la diamanton al la stiristo kaj li donos al vi la monon. Faru tion rapide. Mia sendito foriros tuj se li rimarkos ian suspektaĵon. Se tio okazos, nia interkonsento fiaskos kaj senkulpaj homoj suferos la konsekvencojn. Kaj plie: ne havu la malfeliĉan ideon doni al li falsan ŝtonon.

Kaj Karbunkolo kompletigis sian parolon, kun timiga rido:

— Postmorgaŭ, kiam mi alvenos al Antverpeno, mi konfirmos ĉu vi fakte plenumis vian parton en nia trakto, mia kara S-ro Lufimpu.

— Interkonsentite, S-ro Karbunkolo. Ne gravas al mi la mono, mi nur volas evitigi malfeliĉegon.



Tuj poste, Lufimpu telefonis al granda amiko, Jakobo Benedetto, fama spertulo pri diamantoj.

— Jakobo, mi bezonas grandan komplezon de vi. Nur helpu min, ne demandu kial, ĉar temas pri afero de vivo aŭ morto.

— Kio do, Lufimpu? Kio okazas?

— Mi ne povas klarigi nun. Mi nur povas diri, ke la afero estas tre grava kaj urĝa. Mi petas, ke morgaŭ matene vi iru al la hotelo, kie okazos la kunsido de UN. Estu tie je la deka, ĉar ekde tiu horo la diamanto Blua Songo estos eksponata. Alproksimiĝu al ĝi, ŝajnigu, ke vi ekzamenas ĝin kaj trovu manieron tuj komuniki al la organizantoj de la evento, ke tiu diamanto estas falsaĵo.

— Oho! Kio do, Lufimpu? Ĉu ili eksponos falsan diamanton? Kaj kial mi devas fari tion, kion vi diras?

— Ĝi estos la Blua Songo, ne falsa diamanto, tamen vi devas diri, ke ĝi estas falsa.

— Aĥ! Kio do, Lufimpu? Ĉu vi estas freneza? Kaj mia reputacio?

— Ĉesu krei “Kio do, Lufimpu?”. Mi diris, ke vi ne demandu. Bonvolu fari tion, pro nia amikeco. Mi kaj la homaro estos eterne dankemaj al vi.

— Vi kaj la homaro? Kia afero...

— Do vi helpas min, ĉu?

— Hm! Mi pripensos.



## MULTAJ EMOCIOJ POR KLARA

**K**lara estas belga knabino, orfa je patrino, loĝanta en la urbo Antverpeno. Ofte ŝi malĝojiĝas pro la manko de sia patrino, tamen en tiu tago ŝi estis feliĉa apud sia patro, S-ro Ivo Simon, funkciulo de UN.

Ili iris al la universitato, kie okazas la kongreso de la internacia lingvo, kun ĉeesto de centoj da homoj el ĉiuj mondopartoj. Ŝi estis fiera, ĉar ŝia patro estas speciala invitito. Nome de UN li prelegos por bonvenigi la kongresanojn.

Dum la mateno ili ne povis resti kune, ĉar li devis plenumi mision iel danĝeran: alporti la faman diamanton Blua Songo al la hotelo, kie okazos dum la tuta semajno alia grava evento, kunsido de UN pri produktado de diamantoj.

Li klarigis al la filino, ke tiu kunsido de diplomatoj el multaj landoj okazas en Antverpeno pro tio, ke ĝi estas la plej granda centro de facetado de diamantoj en la mondo.





Survoje Klara vidis afiŝon pri la UN-kunsido kaj io atentigis ŝin:

— Paĉjo, kial la afiŝo montras virojn kun armiloj kaj malriĉajn infanojn, apud la diamantoj?

Li respondis malgaje:

— Filino, la plejmulto el la diamantoj troviĝas en minejoj de Afriko, de kie ili estas eksportataj, facetataj kaj transformataj en valoregajn juvelojn. Tio devus alporti riĉecon al la personoj, kiuj vivas tie, sed bedaŭrinde tio ne okazas. Multaj el tiuj, kiuj laboras en la minejoj, suferas ekspluatadon, kaj ekzistas krimaj organizaĵoj, kiuj kontrabandas la gemojn kaj uzas la monon eĉ por financi militojn.

— Kaj ĉu ne eblas ĉesigi tion? — demandis Klara.

— Jes, mia filino, tio eblas, pro tio UN kunigas ĉi tie diplomatojn el la tuta mondo, serĉante ian solvon.



En la kongresejo, radirante tra la koridoroj sur sia rulseĝo, dum ŝia patro interparolis kun plenkreskuloj, Klara vidis multajn infanojn, ĉiuj tre viglaj. Simpatia virino proponis helpon kaj do ŝi demandis:

— Kiu estas tiuj infanoj? Kial ili estas ĉi tie?

La virino klarigis:

— Ili estas infanoj el la tuta mondo, kiuj uzas la internacian lingvon. Ili venis ĉeesti la malfermon de la kongreso kaj poste ili iros al alia loko en la urbo, kie ili pasigos kune la tutan semajnon.

Klara volis trovi novajn amikojn, sed ŝi ne sciis, kiel alproksimiĝi. Tiam infaneto preterpasis kurante kaj albatigis al ŝia seĝo. Ŝiaj okulvitroj falis sur la plankon kaj estis levitaj de knabo, kiu enmanigis ilin al ŝi kun rideto.

— Dankon! — ŝi ekkriis, ravita de la ĝentileco de la knabo.

— Ne dankinde! — Mia nomo estas Andreo, mi venis el Brazilo. Kaj vi?

— Mi nomiĝas Klara. Mi vivas ĉi tie, en Belgio.

Ili komencis interparoli kaj sentis, post kelkaj minutoj, ke ili jam estas amikoj.

Tamen surpriza fakto interrompis ilian konversacion. Subite kelkaj policianoj aperis kaj eniris la ĉefsalonon. Sekve, meze de murmuroj, la policianoj eliris, puŝante iun per la brako. Tiu estis S-ro Ivo.



Klara iris rekte al ili, kriante:

— Paĉjo, kio okazas? Kien ili kondukas vin?

Vidante la afliktiĝon de la knabino, la policianoj haltis momente, por ke ŝi adiaŭu sian patron.

Ili brakumis unu la alian kaj la patro provis trankviligi ŝin:

— Ne zorgu, filino. Baldaŭ la afero klariĝos kaj ili liberigos min.

Li malleviĝis por kisi ŝin, kaŝe metis ion en ŝiajn manojn kaj flustris kelkajn vortojn en ŝian orelon. Ŝi skuis la kapon kaj forviŝis la larmojn.

Andreo, kiu rigardis la tutan scenon, alproksimiĝis kaj konsolis ŝin:

— Klara, ankaŭ mi ne scias, kio okazas. Mi nur povas diri, ke vi kalkulu je mi kaj miaj amikoj. Se necese, petu nian helpon.



## “FAMA DIAMANTO ESTAS ŜTELITA KAJ ANSTATAŬIGITA PER FALSAĴO”

**E**n la momento, kiam S-ro Ivo estis arestita, neniu komprenis la kialon, sed baldaŭ la tuta urbo jam sciis la motivon. La amaskomunikiloj diskonigis la jenan novaĵon:

*UN anoncis, ke ekde hodiaŭ, en la hotelo kie okazas ĝia kunsido, estos eksponata al la publiko, en vitra skatolo, la fama diamanto Blua Songo.*

*Tamen S-ro Jakobo Benedetto, konata fakulo pri diamantoj, ĉeestis la malfermon de la eksponado kaj surprizis ĉiujn, dirante, ke la ŝtono tie montrata ŝajnas esti falsa.*

*Kun permeso de la respondeculoj pri la gardado de la diamanto, li portis ĝin ĝis fenestro kaj ekzamenis ĝin en la sunlumo. Li konkludis, ke fakte ĝi ne estas la vera Blua Songo.*





*Oni venigis alian fakulon, kiu konfirmis la konkludon de D-ro Benedetto.*

*Nun UN kaj la tuta mondo volas respondojn al ĉi tiuj demandoj: Kie estas la Blua Sonĝo? Kiu ŝtelis ĝin?*

*La nura suspektato ĝis nun estas S-ro Ivo Simon, funkciulo de UN, kiu respondecis pri la transporto de la diamanto al la hotelo. Li estas arestita kaj estos pridemandata.*



## KIU POVAS HELPI KLARAN?

**E**n la sekva tago, antaŭ la komenciĝo de la aktivecoj en la infana kongreso, Andreo, Mavomo, Hua, Eriko kaj Roza kunsidis por denove interbabili. En la antaŭa jaro ili travivis emocian aventuron en Brazilo, kie ili devis solvi misteron pri malaperado de du totemoj, kaj nun, en Antverpeno, ili estis kune alian fojon.

— Mi esperas, ke ĉi-jare nenio stranga okazos — komentis Hua. — Mi venis el Ĉinio volante partopreni en ĉiuj aktivecoj de la kongreso.

— Ankaŭ mi — diris Mavomo, ridante. — Mi volas nur ĝui mian famon. La infanoj rigardas min kaj diras: “Vidu, li estas Mavomo, tiu knabo de la malbeno de Tarumo kaj Nurana.”

Eriko kaj Roza faris similajn komentojn, sed Andreo surprizis ilin per ĉi tiuj vortoj:





— Mi ne volas malhelpi viajn planojn, tamen io diras al mi, ke ni devos solvi misteran aferon denove. Ekde hieraŭ mi ne ĉesas pensi pri tiu knabino, Klara. Estis stranga la maniero, kiel okazis la aresto de ŝia patro.

— Se paroli pri ŝi, Andreo... vidu — diris Roza, fingromontrante la pordon.

Ĉiuj ili turnis sin al la enirejo, kiun ĵus trapasis knabino sur rulseĝo. Ili rigardis ŝin kun granda scivolemo. Ŝi estas Klara, kiu venis renkonte al ili kun mieno de ploro, serĉante helpon.

— Bonvolu helpi min — ŝi diris. — Mia patro estas persono tre bonkora. Li estas akuzita pri la ŝtelo de la diamanto Blua Songo, sed mi estas certa, ke li estas senkulpa.

Tiam ŝi eltiris paperon el poŝo de sia bluzo kaj rivelis ion, kio kaŭzis pli grandan scivolemon inter la infanoj:

— Hieraŭ, kiam la policianoj lasis lin adiaŭi min, mia patro donis al mi ĉi tiun paperon kaj flustris en mian orelon, ke mi povas helpi lin eliri el la prizono, se mi kapablos deĉifri tion, kio estas skribita sur ĝi. Mi vidis, ke la manskribo ne estas lia, ke alia persono skribis la mesaĝon. Mi pasigis preskaŭ la tutan nokton sendorme, provante deĉifri ĝin, sed mi komprenis nenion. Mi scias, ke vi povas helpi min.

Dirante tion, ŝi etendis la paperon al Andreo, kiu estis tuj ĉirkaŭita de la aliaj.



## PLANO POR DEĈIFRI LA ENIGMAN MESAĜON

**A**ndreo laŭtlegis la mesaĝon: “Por ke la antikva tragedio ĉesu, kie ĝi naskiĝis, kaj ne okazu alia en ĝia nova loko, tiu, kiu amas Dion, estas vera, sed ĝi devas ŝajni falsa. Pardonu min.”

— Kio? — diris samtempe preskaŭ ĉiuj, esprimante per la vizaĝo, ke ili komprenis nenion. Nur Hua reagis malsame.

— Trankviliĝu, amikoj, tio estas komprenebla. Unuavide ĉiu enigmo ŝajnas absurda. Ni solvos ĝin, ni estas inteligentaj.

La optimismo de Hua trankviligis la aliajn.

— Hua pravas — diris Andreo. — Ni bezonas planon. Klara, vi diris, ke via patro ne skribis la mesaĝon. Ĉu vi havas ideon pri tiu, kiu skribis ĝin?

— Ne — respondis Klara. — Mia patro provis diri al mi, sed ne estis



tempo. La policianoj permesis al li paroli kun mi nur kelkajn sekundojn. Mi nur scias, ke matene li iris preni la diamanton en konsulejo de afrika lando.

— Do ni devas iri al tiu konsulejo — proponis Eriko.

— Kaj estas bone paroli kun la patro de Klara — diris Roza.

Vidante, ke Hua restas silenta, kun la mano sub la mentono kaj rigardante mapon de la urbo, ĉiuj observis ŝin. Ili esperis, ke ŝi jam trovis solvon por la kazo. Ŝi rimarkis la atenton de la amikoj kaj diris, ke ŝi ankoraŭ cerbumas, sed ke ŝi havas proponon al ili.

Laŭ la propono de Hua, tuj akceptita, ili dividis sin en du grupojn: tri el ili provos paroli kun la patro de Klara en la policejo, kaj la tri aliaj serĉos informojn en la konsulejo.

Hua proponis, ke Klara, Eriko kaj Roza iru al la policejo, tamen Andreo kontraŭproponis, ke li, ne Eriko, iru kun la knabinoj. Eriko, Mavomo kaj Roza ridis, ĉar ili komprenis, ke Andreo volas resti kun Klara. La vizaĝo de Hua montris ĵaluzon, tamen ŝi konsentis. La vizaĝo de Klara ruĝiĝis, tamen interne ŝi ŝatis la sintenon de Andreo.

Hua montris punkton sur la mapo kaj diris:

— Kio ajn okazos, ni devos renkontiĝi en ĉi tiu loko, la enirejo de la Ĉina Kvartalo, je la dekseca horo. Esta facile rekoni ĝin: tie estas du leonoj el ŝtono gardantaj la pasejon.



## KONFUZO EN LA POLICEJO


**A**ndreo, Klara kaj Roza trovis grandan tumulton en la policejo. Multaj ĵurnalistoj estis en la enirejo, serĉante informojn. Ili demandadis la policianojn, ĉu la funkciulo de UN konfesis la krimon kaj ĉu la vera diamanto jam estas trovita.

Danke al la konfuzo, la infanoj sukcesis eniri kaj atingi la akceptejon. Klara sin prezentis kaj petis permeson vidi sian patron, sed la deĵoranta policianino neis:

— Mi bedaŭras, knabino. Nur lia advokato rajtas paroli kun li. Ĉi tie ne estas loko por infanoj, revenu hejmen.

Andreo ne rezignis kaj estis preta plendi, tamen Roza tuŝis lian brakon, palpebrumis al li kaj faris ion tute neatenditan. Ŝi ekparolis laŭte:







— Jen kia absurdo, sinjoroj ĵurnalistoj! Tiu knabino, orfa je patrino, suferas pro la aresto de sia patro. Ŝi nur volas paroli kun li kelkajn minutojn kaj oni ne permesas tion. Tio estas malrespekto, precipe al la rajtoj de handikapita infano...

Policanino iris rekte al Roza, por interrompi ŝian paroladon, sed en tiu sama momento la ĵurnalistoj alproksimiĝis scivole por filmi la proteston de la knabino. Aliaj policianoj intervenis kaj formiĝis konfuzego.

Vidante, ke ĉiuj atentoj turniĝas al Roza, Andreo kaj Klara kuris en la internon de la policejo. Ili rapide rigardis en ĉiujn ĉambrojn kaj bonŝance baldaŭ trovis en unu el ili S-ron Ivo, kiu estis tre malvigla. Li surpriziĝis pro la neatendita vizito kaj longe ĉirkaŭprenis sian filinon, inter ridoj kaj larmoj.

— Malfeliĉe ni ne havas multe da tempo, S-ro Ivo — avertis Andreo. — La policianoj venos tuj forpeli nin. Ni venis demandi ĉu vi jam malkovris, kiu ŝtelis la diamanton, kaj ĉu vi sukcesis deĉifri la mesaĝon...

La frazon de Andreo interrompis du policianoj, kiuj alvenis kaj tuj forpuŝis ilin. Jam en la koridoro, ili aŭdis S-ron Ivo, kiu kriis per maltrankvila voĉo:

— Lufimpu! Lufimpu! Serĉu lin en la konsulejo... dikaj okulvitroj. Mi deĉifris parton de la mesaĝo: tiu, kiu amas Dion, estas di...

Nur tion ili aŭdis. La cetero perdiĝis pro la krioj de la policianoj kaj la bruado de la ĵurnalistoj, kiuj ankoraŭ provis intervjui Rozan.



La policianoj kondukis Andreon kaj Klaran eksteren. Per krioj la infanoj vokis Rozan, sed ŝi hezitis. Ŝi deziris resti tie, aperi en la televido, tamen ŝi sciis, ke necesas iri kun la amikoj. Fine ŝi decidis forlasi la ĵurnalistojn kaj kuris sur la straton.

— Ni bezonas malproksimiĝi rapide — diris Andreo, puŝante plej forte la seĝon de Klara.

Post kelkaj minutoj, ili rimarkis, ke la ĵurnalistoj ne plu sekvas ilin. Tiam ili haltis por decidi kion fari. Ili ne eltrovis multon pri la mesaĝo, tamen ili almenaŭ sciis, ke la persono, kiun ili devas serĉi en la konsulejo, nomiĝas Lufimpu.

Do ili decidis lui taksion kaj iri renkonte al siaj geamikoj, por doni al ili tiun informon. Tamen ili ne sciis, ke jam estas malfrue por fari tion...

## FORRABITAJ APUD LA KONSULEJO

**H**ua, Mavomo kaj Eriko prenis buson por iri al la konsulejo. Survoje ili provis deĉifri la mesaĝon, sed ili sukcesis konkludi nur ke ĝia aŭtoro verŝajne ne estas malbonulo, ĉar en la fino li petis pardonon.

Tio trankviligis ilin iomete, tamen la trankvileco baldaŭ malaperos.

Post kiam ili eliris el la buso, ili piediris al la konsulejo. Tiam furgono de tollavejo, kun nigraj glacoj, haltis apud ili. La stiristo eliris, malfermis ĝian malantaŭan pordon kaj samtempe alia viro aperis malantaŭ ili. Li movis la manon sub la jakon, kvazaŭ tie estas armilo.

— Eniru en la furgonon, infanoj, sen bruo — li ordonis.

La tri infanoj interŝanĝis rigardojn, Eriko signis, ke ili forkuru, tamen Hua tenis lian brakon.

— Estas pli bone obei. Eble li estas armita.





La viroj sidigis ilin sur la plankon de la furgono kaj vindis iliajn okulojn. La dua viro sidiĝis apud la stiristo kaj ili ekveturis. Post ĉirkaŭ dek kvin minutoj, la infanoj aŭdis bruon de pordego, kiu estis malfermita kaj fermita malantaŭ ili. Tuj post la banditoj fortiris ilin el la veturilo kaj ordonis, ke ili paŝu antaŭen.

La vidoj estis demetitaj kaj tiam ili vidis, ke ili estas en ĉambro preskaŭ malplena. Tie estis nur malgranda tablo kaj kelkaj matracoj sur la planko. Sur unu el ili estis tremanta junulo, kun dikaj okulvitroj kaj malfermegitaj okuloj. Ili tuj komprenis, ke ankaŭ li estas viktimo de la banditoj.

— Saluton, mi estas Lufimpu — murmuris li, dum li fingromontris la pordon kaj signis, ke ili parolu mallaŭte. — Atentu, ke la kaptintoj ne aŭdu nin.



## LABORO EN SKIPO

**E**n la taksio, survoje al la konsulejo, Andreo, Klara kaj Roza interparolas pri la mesaĝo, ĉiam memorante la vortojn de S-ro Ivo: “Lufimpu! Lufimpu! Serĉu lin en la konsulejo... dikaj okulvitroj. Mi deĉifris parton de la mesaĝo: tiu, kiu amas Dion, estas di...”.

Baldaŭ Roza solvis parton de la enigmo:

— Lufimpu estas vira nomo — diris ŝi. — Ĝi estas afrika nomo. Do Lufimpu devas esti persono de la konsulejo, kiu uzas dikajn okulvitrojn. Eble li donis la mesaĝon al S-ro Ivo.

— Verŝajne vi pravas — diris Andreo. — Ni koncentriĝu nun sur la teksto de la mesaĝo.

Li legis ĝin denove, aldonante la etan informon de la patro de Klara: “Por ke la antikva tragedio ĉesu, kie ĝi naskiĝis, kaj ne okazu alia en ĝia nova loko, tiu, kiu amas Dion (di...) estas vera, sed ĝi devas ŝajni falsa. Pardonu min.”





Tiam okazis kurioza afero. En Antverpeno estis multaj strataj afiŝoj kun fotoj de grandegaj diamantoj. Klara vidis unu el ili tra la fenestro de la taksio kaj tuj venis ideo en ŝian kapon:

— Ho jes, estas klare! Kial mi ne komprenis tion antaŭe? La mesaĝo temas pri diamanto, pro tio en ĝi estas la vortoj “vera” kaj “falsa”. Mia patro parolis “diamanto”, sed ni aŭdis nur la komencon de la vorto.

Andreo kaj Roza ekĝojis, sed baldaŭ iliaj duboj revenis, ĉar ŝajnis absurda la frazo “tiu, kiu amas Dion estas diamanto”.

Tamen subite Andreo havis sian momenton de gloro kaj fariĝis tre kontenta, ĉar li sukcesis favore impresi Klaran. Li solvis la ŝaradon.

— Vidu — li diris. “Tiu, kiu amas” estas “amanto”. Se ni kunigas la vortojn “Dio” kaj “amanto”, formiĝas “Di-amanto”, tio estas, “Tiu, kiu amas Dion” aŭ la valora ŝtono: “diamanto”.

Ĉar la vizaĝoj de la knabinoj montris, ke ili ankoraŭ sentas dubon, li prenis paperon kaj desegnis:

*TIU, KIU AMAS = AMANTO*

*DIO + AMANTO = DI-AMANTO*

*DIAMANTO = TIU, KIU AMAS DION*

*DIAMANTO = LA VALORA STONO*





— Bonege, Andreo — ekkriis Klara, aplaŭdante. — Do la mesaĝo fariĝas tia: “Por ke la antikva tragedio ĉesu, kie ĝi naskiĝis, kaj ne okazu alia en ĝia nova loko, la diamanto estas vera, sed devas ŝajni falsa. Pardonu min.”

Roza aldonis:

— Lufimpu volis diri, ke la diamanto estas vera, sed devas ŝajni falsa. Li volis sciigi S-ron Ivo, ke la diamanto, kiun li alportis, estas la Blua Songô, sed ĝi devas esti rigardata kiel falsa. Kaj fakte oni diras, ke la diamanto estas falsa. Tamen mi ne komprenas, kial li skribis tion.

Klara montriĝis denove tre inteligenta. Ŝi deĉifris alian parton de la mesaĝo:

— La Blua Songô estis trovita en Afriko, tio estas, ĝi naskiĝis en tiu kontinento, kaj ĝia nova loko estas la hotelo, kie okazas la kunsido de UN. Mia patro diris, ke la produktado de diamantoj en Afriko estas vera tragedio, ĉar ĝi okazigas ekspluatadon kaj multajn mortojn.

— Tre domaĝe, Klara, tamen via rezonado estas mirinda — diris Andreo, kaj li mem legis alian fojon la mesaĝon, kun la nova parto de ĝia solvo: “Por ke la antikva tragedio ĉesu, en Afriko, kaj ne okazu alia en la hotelo, kie okazos la kunsido de UN, la diamanto estas vera, sed devas ŝajni falsa. Pardonu min.”

Ili ĵus malkovris, ke la Blua Songô devas ŝajni falsa por ĉesigi la tragedion, kiu okazadis en Afriko, kaj por evitigi alian, en la hotelo.



— Ni bone progresas — komentis Roza, — tamen ankoraŭ restas teruraj duboj: kia tragedio povas okazi en la kunsido de UN, kaj kial povas evitigi ĝin la fakto, ke la diamanto estu rigardata kiel falsa?

Tion la tri amikoj ne komprenis. Ili estis certaj nur pri du faktoj: malantaŭ tiu mistero estas unu aŭ pliaj malbonuloj kaj iliaj amikoj, kiuj iris al la konsulejo, estas en danĝero.



## LA IDEO DE MAVOMO

**D**ume, en la kaptitejo Hua, Mavomo kaj Eriko cerbumis, kiamaniere komunikiĝi kun Lufimpu. Ili sciis, ke la junulo havas ion gravan por diri, tamen estas risko, ke iu rabisto aŭdos. Ĉiumomente unu el ili venis vidi, kion ili faras.

Estis Mavomo, kiu trovis solvon. Subite li sin direktis al Lufimpu, kantante en la bangala, afrika lingvo. Bonŝance ankaŭ Lufimpu konis tiun idiomon kaj ekkantis alian kanzonon. Kiam ili vidis, ke ili komprenas unu la alian, ili komencis interparoli, ĉiam en muzika ritmo.

— He! Silentu! — kriis unu el la rabistoj. — Ĉesigu tiun kantaĉon.

Lufimpu kaj Mavomo tuj eksilentis, sed Hua, kiu jam komprenis ilian planon, iris ĝis la pordo kaj petegis:

— Estu kompatema, lasu ilin kanti. Almenaŭ tiel la tempo pasas pli rapide.





La rabisto respondis ridante, per malŝata voĉo:

— Nu, bone, knabino. Mi estas bonulo, do mi lasos viajn amiketojn en paco por kanti tiajn idiotaĵojn.

Lufimpu ridetis, danke okulumis al Hua kaj rekomencis rakonti al Mavomo, per kantataj frazoj, kio okazis ekde kiam li ricevis la pakaĵon kun la falsa diamanto kaj la telefonvokon de Karbunkolo. Siavice, Mavomo tradukis al Hua kaj Eriko, ankaŭ kantante, en la internacia lingvo. Kaj ankaŭ Hua kaj Eriko faris muzikigatajn demandojn.

Ĉar neniu el ili havis talenton por kanti, la konversacio iĝis spektaklo de malagordo. La situacio estis serioza, sed tiu formo de komunikado estis tiel amuza, ke post kelkaj momentoj ĉiuj komencis ridi.

La rabisto tute ne komprenis tiun scenon. Li turnis fingron ĉirkaŭ la orelon kaj grumblis:

— Kiaj frenezuloj! Se ili scius, kion la ĉefo faros al ili...



## LA KLARIGOJ DE LUFIMPU

**T**iamaniere Lufimpu sciigis la infanojn pri la telefonado, kiun li faris al Jakobo Benedetto. Li diris, ke li ne povis avizi la policon pro la minaco de Karbunkolo, kaj ke li transdonis al S-ro Ivo la veran diamanton, la Bluan Songon, kune kun la enigma mesaĝo, esperante, ke li, estante tre inteligenta persono, kapablos deĉifri ĝin kaj evitigi la plej malbonon.

S-ro Ivo alvenis en la konsulejo akompanata de kelkaj gardistoj. Kiam li ricevis la Bluan Songon el la manoj de Lufimpu, ĉi tiu petis lin, mallaŭtvoĉe, ke li metu en sian poŝon la paperon kun la mesaĝo, sen fari demandon. Pro la grava mieno de Lufimpu, li komprenis, ke io grava okazas. Li nur diris, ke estas malfrue, kaj foriris.

Hua volis scii, kio okazis poste, kial li estis kaptita. Lufimpu rakontis, ke tuj post kiam la funkciulo de UN foriris, la sendito de Karbunkolo alvenis por preni la diamanton. Lia intenco estis liveri la falsan diamanton al la sendito kaj



iri plej rapide al la hotelo por klarigi la situacion kaj provi interrompi la eventon, antaŭ ol Karbunkolo rimarkos la trompon kaj plenumos la minacon okazigi tragedion.

Okazis tamen, je surprizo de Lufimpu, ke li ne restis libera. La sendito prenis la diamanton kaj devigis lin eniri en la furgonon, minacante lin per armilo. Li estis metita en tiun domon, kie li jam pasigis tagnokton, meze de premsonĝoj pro la minaco de la bandito.

Tamen Lufimpu iom trankviliĝis, kiam la infanoj diris al li, ke la diamanto alportita al la universitato estis rigardata kiel falsa. Tio estis signo, ke lia amiko Jakobo plenumis lian peton.

Kiam unu el la infanoj demandis, ĉu li vidis Karbunkolon, Lufimpu frostotremis kaj rakontis tion, kion li aŭdis de unu el la rabistoj ĵus antaŭ ilia alveno: li, la timata ĉefo, la Numero Unu, estas survoje, li venas por kontroli, ĉu la diamanto liverita de Lufimpu fakte estas la Blua Sonĝo, kaj ankaŭ por decidi kian finon li metos al Lufimpu kaj al iu ajn, kiu provis malhelpi liajn planojn.

Ankaŭ la infanoj ektimis, kiam ili aŭdis tion, ĉar ili antaŭvidis, ke Karbunkolo baldaŭ alvenos kaj rimarkos, ke li estis trompita.



## KIEL SCIIGI LA ALIAJN PRI LA RABO?

**L**a koro de ĉiu el ili ekbatis pli forte, kiam ili aŭdis, ke unu el la rabistoj, la Numero Du, ekkriis:

He, Numero Kvar! Numero Unu ĵus telefonis. Li diris, ke li survojas kaj estos ĉi tie post unu horo maksimume.

Ili sciis, ke la tempo elĉerpiĝas kaj ili bezonas eliri el tie. Kion faros Karbunkolo, kiam li vidos, ke Lufimpu liveris al li la falsan diamanton?

Mavomo, Eriko kaj Lufimpu komencis senesperigi, sed Hua tenis sin trankvila. Ŝi rigardis sian horloĝon: 15h40. Tiam ŝi mansignis, ke ili lasu ŝin agi. Ŝi iris ĝis la pordo kaj ekparolis al Numero Du.

— Sinjoro, mi havas ion gravan por malkaŝi. Tio povas savi nian haŭton kaj ankaŭ la vian.





— Kion vi diras, knabino? Kia stultaĵo! — li respondis, malĝentile.

— Ne estas tempo por multaj klarigoj — flustris Hua, — sed vi vidos, kiom grava tio estas. Kaj mi ne povas paroli plu apud miaj amikoj.

Kvankam suspektema, la rabisto puŝis Huan en la koridoron kaj aŭdis, kion ŝi volis diri. Kiam ŝi finis, li malfermegis la okulojn, pripensis kelkajn sekundojn kaj decidis:

— Ni iru en la furgonon, rapide!

Numero Kvar alvenis kurante, kiam li rimarkis, kio okazas.

— Kien vi iras, Numero Du?

— Poste mi klarigos al vi, la afero urĝas. Gardu la aliajn, mi revenos baldaŭ.

Kiam la furgono eliris el la garaĝo, Hua notis en sia memoro la numeron de la domo, kaj en la stratangulo ŝi sukcesis vidi la nomon de la strato. Ŝi rigardis atente la vojon, por scii kiel reveni tien, pensante: “Se mia plano funkcios, ni atingos la enirejon de la Ĉina Kvartalo ĉirkaŭ la 16-a horo. Andreo, Roza kaj Klara estos tie kaj povos helpi min.”

Dum Numero Du stiris plenrapide, li ne rimarkis, ke Hua elpoŝigis notlibreton kaj skribis ion. Ŝi prenis ankaŭ maĝumon.

Kiam la rabisto parkumis la furgonon, en la Ĉina Kvartalo, Hua ekvidis ĝian enirejon kaj la du ŝtonajn leonojn, sed ŝiaj amikoj ankoraŭ ne estis tie. Do ŝi bezonis gajni tempon.





— Ni alvenis, tie estas la enirejo de la Ĉina Kvartalo. Kie estas la vera diamanto? — demandis malpacience la bandito.

— Trankviliĝu — respondis Hua, fingromontrante fenestron de la unua etaĝo de konstruaĵo, sur kafejo trans la strato.

— Ĝi estas tie — ŝi diris, — laŭ la informo de Lufimpu. Atendu ĉi tie en la furgono, dum mi iros preni la diamanton kaj revenos post kvin minutoj.

Numero Du reagis per nervoza rido:

— Ha fi! Ĉu vi pensas, ke mi estas idioto?

La rabisto malfermis la pordon de la furgono, elpuŝis Huan per ŝia brako kaj ekpaŝis kun ŝi direkte al la loko, kiun ŝi montris. Kiam ili trapasis la enirejon de la kvartalo, Hua rapide tuŝis la dekstran leonon. Ili iris al la kafejo kaj, kiam ili eniris ĝin, ŝi komencis krii:

— Helpu, helpu min! Ĉi tiu viro vundas min, li estas rabisto.

Kelkaj viroj ekstariĝis por helpi la knabinon. Vidante tion, Numero Du liberigis ŝian brakon kaj forkuris al la furgono. Hua kuris en kontraŭan direkton.

En tiu momento, Andreo, Roza kaj Klara alvenis al la renkontiĝejo. Ili ĉirkaŭrigardis kaj ne vidis la tri amikojn.

— Ni atendu — diris Andreo. — Certe ili alvenas.



— Ne, Andreo, ili ne alvenos — ekkriis Roza, kiu paliĝis, kiam ŝi legis la paperon gluitan sur unu el la leonoj. — Dio mia! Ili estas rabitaj.

Andreo prenis la paperon el ŝiaj manoj kaj kuris direkte al taksio, kiu alproksimiĝis.

— Strato de la Floroj, 60. Bonvolu iri kiel eble plej rapide — li diris al la ŝoforo.

Dume, Hua rimarkis, ke la rabisto foriris, kaj ŝi revenis kurante al la statuo. Tie ŝi vidis, ke la papero ne plu estas gluita sur ĝi. Ŝi ĉirkaŭrigardis kaj vidis taksiiston, kiu faldis rulseĝon kaj metis ĝin en la valizujon. “Tiu estas ili”, ŝi pensis. Ŝi tuj ekkuris, sed ŝi ne havis tempon atingi ilin. Tiam estis ŝia vico voki taksion kaj paroli:

— Strato de la Floroj, 60. Bonvolu iri kiel eble plej rapide.



## LA FORKURO

**P**ost kiam Hua eliris, Numero Kvar iris gardi la kaptitojn. La tri estis tre streĉitaj. Ili ne konis la planon de Hua. Mavomo kaj Eriko fidis ŝin, ili sciis, ke ŝi estas tre inteligenta, tamen ili timis, ke io malbona okazos.

Ilia sango frostiĝis, kiam ili aŭdis unu el la rabistoj krei:

— Numero Kvar, venu tuj, Numero Unu alvenas, malfermu la pordegon. Kaj Numero Du ne alvenas... La ĉefo furioziĝos.

Karbunkolo alvenis. Ili sciis, ke post kelkaj momentoj ili estos perditaj, ĉar li rimarkos, ke la diamanto estas falsa. Kion do fari? Ĉu resti tie, senmovaj, atendente la finon?

Ne, tute ne! Kiam ili vidis, ke Numero Kvar foriris por akcepti la estron kaj lasis la pordon malfermita, ĉiuj iris en la koridoron.



— Ni iru tien, rapide — diris Lufimpu, direktante ilin al la malantaŭo de la domo. — La garaĝo estas en la alia flanko.

Ili venis en la korton, kiu estis ĉirkaŭita de alta muro. Estis pordego por eliri al la strato, sed ĝi estis ŝlosita. Dum ili cerbumis, kiel eskapi el tiu loko, ili aŭdis teruran kriegon:

— Diable! Ĉi tiu diamanto estas falsa! Irigu min al tiu fripona diplomataĉo. Mi metos finon al li!

— Ni bezonas fuĝi — diris Mavomo, per tremanta voĉo, kurante tien kaj reen, ne sciante, kion fari. — Ili tuj trovos nin.

Ankaŭ Lufimpu sentis timegon. Li eĉ ne vidis bone, ĉar lia ŝvito malklarigis la lensojn de liaj okulvitroj.

Feliĉe Eriko havis malvarman sangon por rapide esplorrigardi la lokon kaj trovi eskalon, kiu kuŝis en angulo.

— Sekvu min — li kriis, apogante la eskalon al la muro kaj ekgrimante.

Mavomo kaj Lufimpu supreniris malantaŭ li. La rabistoj jam vidis, ke ili ne estas en la ĉambro. Ĝuste kiam Lufimpu saltis sur la trotuaron, ili alvenis en la korton, pafante.

Dum la triopo forkuris, la banditoj komencis grimpi per la eskalo, sed ili havis malfacilon, ĉar Karbunkolo, kiu estis maljuna kaj grasdika, provis grimpi unue kaj malhelpis siajn subulojn.





— Kia bonŝanco! Jen venas taksio, ni haltigu ĝin — diris Eriko.

Fakte alvenis du taksioj, ambaŭ tre rapide, kaj la du haltis apud la tri forkurantoj. La pordo de la unua malfermiĝis kaj aperis Andreo, la pordo de la alia malfermiĝis kaj aperis Hua. Ĉar ili ne sciis pri la alproksimiĝo de banditoj kun revolveroj, ili alvokis la amikojn trankvile. Hua eĉ faris ŝercon, klinante la kapon antaŭen, laŭ kutimo de orientanoj:

— Ĉu vi akceptas veturigon, sinjoroj? — ŝi diris.

Tamen, neniu ridis. Ili ĵetis sin en la aŭtomobilojn kaj petis, ke la stiristo akcelu. Estis ĝustatempe! En tiu momento la senhara kapo de Karbunkolo ekaperis super la muro kaj ili aŭdis pafojn kaj kriojn “Diable! Malbenon!”. Post kelkaj minutoj ili jam estis tre malproksime, en sekureco.





## KAJ LA BLUA SONGŔO, KIE ĜI ESTAS?

**B**aldaŭ ĉiuj estis en la universitato, tre lacaj pro la aventuro. Ili ankoraŭ ne komprenis ĉion, kio okazis. Ĉiu grupo rakontis sian parton en la aventuro.

Hua klarigis, kion ŝi faris por konvinki la rabiston eliri kun ŝi el la domo:

— Mi diris al li, ke ili estas kun la falsa diamanto, kaj ke, kiam Karbunkolo rimarkos tion, li punos ne nur nin, sed ankaŭ ilin, pro tio, ke ili estis trompitaĵoj de Lufimpu. Mi parolis ankaŭ, ke mi scias, kie Lufimpu lasis la veran diamanton, kaj ke mi iros kun li fari la ŝanĝon, antaŭ ol Karbunkolo alvenos. Mi donis al li la adreson de nia renkontiĝejo, la enirejo de la Ĉina Kvartalo. Mi supozis, ke eble mi alvenos tie antaŭ la 16-a horo kaj ne trovos vin. Do mi preparis tiun paperon kun la adreso de la domo kaj kun averto, ke ni estas rabitaĵoj, por glui ĝin sur unu el la leonoj. Feliĉe tio funkciis.



— Vi agis tre lerte, kiel ĉiam, Hua — komentis Andreo. — Danke al via plano, ni saviĝis de la banditoj. Tamen ni ne havas tempon por ĝuado. Ekzistas la risko, ke Karbunkolo plenumos la minacon, kiun li faris al Lufimpu, kaj okazigos tragedion en la evento de UN.

— Vi pravas, Andreo — konsentis Lufimpu. — Ni devas iri tuj al la hotelo kaj paroli al la organizantoj, ke ili bezonas interrompi la kunsidon kaj malplenigi la lokon.

Tion ili faris. En la hotelo, Lufimpu sin prezentis kiel reprezentanto de la konsulejo, resumis la okazintaĵojn, petis, ke ili redonu al li la diamanton Blua Songô, kaj avertis, ke ili devas urĝe elirigi ĉiujn personojn, kiuj estas tie.

La reago de la funkciulo de UN estis surpriza:

— Sinjoro Lufimpu, ĉu tio estas ia ŝerco? Se jes, sciu, ke ĝi estas tute sensprita. La tuta mondo jam scias, ke la diamanto alportita ĉi tien estas falsa, ĝi ne estas la Blua Songô.

Lufimpu insistis, petis konfirmon de sia rakonto ĉe S-ro Jakobo Benedetto, sed la funkciulo restis malcedema:

— Estis li, kiu avertis nin, ke la diamanto estas falsa, kaj aliaj spertuloj konfirmis tion — li diris, jam kolereta kaj mansignante al gardisto.

Lufimpu rimarkis, ke ili intencas forpeli lin perforte. Tiam li parolis pli laŭte:



— Jakobo faris tiun averton, ĉar mi petis tion de li, por evitigi tragedion. Multaj homoj povos morti ĉi tie, kaj vi estos respondeca...

Li estis interrompita de korpulenta gardisto, kiu tenis lian brakon kaj puŝis lin eksteren.

La infanoj, kiuj atendis en la akceptejo, maltrankviliĝis, kiam ili vidis, ke Lufimpu luktas por liberigi sin de la gardisto. Kaj tuj poste ili ektimis, ĉar alvenis policaŭto.

Dum la policanoj enŝovis lin en la aŭton, Lufimpu havis tempon nur por turni sin al la infanoj kaj rapide paroli:

— Mia plano ne funkciis, ili ne kredis min. Estas strange, ili diris, ke aliaj spertuloj konfirmis, ke la diamanto alportita ĉi tien estas falsa. La kunsido de UN daŭros. Serĉu Jakobon, sed restu singardaj...



## RESTAS MALMULTE DA TEMPO

— Ĉu Lufimpu suspektas, ke Jakobo Benedetto ŝtelis la veran diamantoj, kaj pro tio li petis, ke ni serĉu lin kaj restu singardaj? — diris Andreo.

— Povas esti — komentis Hua. — Tamen li diris, ke ili estas grandaj amikoj. Do eble li pensas, ke nur Jakobo Benedetto kapablas helpi nin, ĉar estis li, kiu avertis, ke la diamanto estas falsa.

— Se estas tiel, Hua, kial li avertis nin pri danĝero? — demandis Eriko.

— Nu, Eriko. Ĉu Jakobo Benedetto kulpas, ĉu li ne kulpas, certe ni devas esti singardemaj. Ni travivas aventuron pri malapero de valorega diamanto kun armitaj banditoj, kiuj minacas okazigi tragedion.

— Hua pravas, amikoj – intervenis Roza. — Ni ja devas atenti. Tamen ne utilas, ke ni restu ĉi tie, diskutante. Mi proponas, ke ni iru tuj viziti tiun faman fakulon pri diamantoj.



Klara konsentis kun Roza:

— Roza pravas. Ĉu vi memoras, kion Lufimpu diris, kiam li rakontis pri sia kontakto kun Karbunkolo? La bandito diris “Ne voku la policon. Se mi vidos, ke oni plifortigas la sekurecon ĉirkaŭ la hotelo, la tragedio estos eĉ pli granda.”

Ĉe tiu rememoro, ĉiuj konvinkiĝis, ke ne estas alia afero por fari krom trovi Jakobon Benedetton, rapide. Kaj singardeme, ĉar ili ne sciis, ĉu tiu viro estas danĝera aŭ ne.



## LA KAZO FINIĜAS

**I**li trovis la adreson de Jakobo Benedetto en la telefonlisto kaj direktis sin al lia domo. Kiam ili alvenis, ili vidis, ke la pordego malfermiĝas kaj eliras aŭtomobilo.

Subite ĉiuj miregis, ĉar Klara metis sian seĝon antaŭ la aŭtomobilon. Pro la neatenditaĵo, la stiristo tuj bremsis kaj eliris el la veturilo.

— Kio okazas, kia frenezaĵo estas tia, knabino? — li diris, rigardante kun miro Klaran kaj la infanojn, kiuj sekvis ŝin.

— Hm! Mi pensas, ke mi scias, kiu estas vi — daŭrigis li. — Jes, vi estas la filino de S-ro Ivo Simon. Antaŭ kelkaj tagoj li venis paroli kun mi pri diamantoj kaj li komentis pri vi. Li diris, ke li devas preni la faman diamanton Blua Songô en la konsulejo kaj porti ĝin al la hotelo, kie okazos la kunsido de UN. Kaj koincide ankaŭ mia amiko Lufimpu telefonis al mi poste, kaj petis, ke mi faru komplezon al li pri la sama diamanto.



Pro la aspekto de S-ro Jakobo kaj pro la milda tono de lia voĉo, la infanoj malstreĉiĝis. Ili sentis, ke li estas bonulo. Ĉiuj ekparolis samtempe, por rakonti kio okazis kaj ankaŭ por demandi ĉu li scias, kie estas la Blua Songo.

— Trankviliĝu, infanoj, poste vi rakontos al mi ĉiujn okazaĵojn. Nun mi hastas. Mi ĵus aŭdis el radioaparato, ke Lufimpu estas arestita. Mi iras al la policejo, kun la vera diamanto, por klarigi ĉion.

“Do la Blua Songo estas kun li, bonege!” — ĉiuj pensis, kun entuziasmo pro la novaĵo, tamen ne komprenante, kiel tio okazis.

Post kelkaj minutoj, S-ro Jakobo liveris la Bluan Songon al la polico kaj ĉio solviĝis. La kunsido de UN estis interrompita ĝis ili trovos kaj arestos Karbunkolon. S-ro Ivo kaj Lufimpu estis liberigitaj.



## LASTAJ KLARIGOJ

**K**iam ili eliris el la policejo, multego da ĵurnalistoj ĉirkaŭis ilin, por koni ĉiujn detalojn de la kazo. Ĉiu intervjuo rivelis parton de la historio kaj fine oni vidis, ke ĉiuj agis kun multe da kuraĝo kaj inteligenteco en danĝera aventuro.

La ĵurnalistoj faris ankoraŭ kelkajn demandojn, kiuj klarigis la lastajn dubojn.

Al Lufimpu ili demandis:

— Kial vi uzis la internacian lingvon por skribi la enigman mesaĝon?

Li klarigis:

— Antaŭ kelkaj monatoj, S-ro Ivo Simon kontaktis min kaj ni konversaciis pri la transporto de la diamanto Blua Sonĝo. Tiam mi malkovris, ke li, same kiel





mi, komencis lerni la internacian lingvon, ĉar okazos la kongreso en nia urbo. Mi rememoris tion, kiam mi decidis skribi la mesaĝon.

La ĵurnalistoj faris demandon pri tio al S-ro Ivo, kaj li klarigis:

— Survoje de la konsulejo al la hotelo, mi legis la mesaĝon de Lufimpu kaj sukcesis deĉifri, ke “tiu, kiu amas Dion” estas “diamanto”, sed mi ne komprenis, kial la diamanto devas esti rigardata kiel falsa. Poste, kiam me eksciis, ke spertuloj diris, ke ĝi estas falsa, mi rimarkis, ke tio konfirmis la enhavon de la mesaĝo. Kiam la policanoj arestis min, mi decidis transdoni la mesaĝon al mia filino, ĉar mi sciis, ke ŝi petos helpon por pruvi mian senkulpecon.

Kaj la demando farita al S-ro Jakobo forigis la lastan dubon:

— Sinjoro Jakobo, ĉu la diamanto transportita de la konsulejo al la hotelo estis vera aŭ falsa? Kaj kiel la Blua Songô alvenis en viajn manojn?

Sciante, ke lia informo estas la plej atendata, Jakobo Benedetto prenis mienon de Ŝerloko Holmso kaj reliefigis sian gravecon en la kazo:

— Bone, kiel Lufimpu jam diris, mi estis la taŭga persono por helpi lin, ĉar mi estas la plej respektata taksisto pri diamantoj en la mondo. Kiam li diris al mi, ke la Blua Songô estos eksponata en la kunsido de UN, sed ke oni devos rigardi ĝin kiel falsan, en tiu momento mi havis brilan ideon, tiel brilan kiel la Blua Songô mem. Pardonu min pro la vortludo.



Kaj li daŭrigis:

— Lufimpu metis min en komplikajon, ĉar, pripensu bone, gesinjoroj, mi ne povus simple alveni en la kunsidon de UN kaj diri: “He! Tiu diamanto estas falsa, ĝi ne estas la Blua Songô.” Eĉ sciante, ke mi, Jakobo Benedetto, estas la plej granda konanto de diamantoj en la mondo, certe ili volus koni la opinion de aliaj fakuloj. Kaj tiuj aliaj fakuloj dirus: “Ĉi tiu diamanto ja estas la Blua Songô.” Ĉu tio ne damaĝus mian reputacion?

Kaj vidante, ke ĉiuj scivolas, kiel li savis sian reputacion, li konkludis, kun esprimo de triumfo:

— Bonŝance, krom spertulo pri diamantoj, mi estas ankaŭ amatora magiisto. Danke al tio mi sukcesis helpi mian amikon Lufimpu kaj fine evitigi tragedion. Mi kunportis en la hotelon, en mia poŝo, falsan diamanton, sed similan al la Blua Songô. Kiam ili donis al mi la veran diamanton, por ke mi ekzameni ĝin kontraŭ la lumo, mi rapide interŝanĝis ilin, tiel ke neniu rimarkis tion. Do mi liveris al la personaro de UN falsan diamanton, kaj pro tio la alia spertulo konfirmis mian informon, ke la eksponata diamanto estas falsa. Simple, ĉu ne?



## ADIAŬOJ

**E**n la sekva mateno, la infanoj povis reveni en la kongreson. Klara ricevis permeson de sia patro por iri kun ili kaj partopreni en la aktivecoj ĝis la lasta tago.

En la horo de la adiaŭoj, Lufimpu petis minuton da atento:


— Miaj amikoj, mi volas lasi etan memoraĵon al ĉiu el vi.

— Hura! — ŝercis Andreo. — En Brazilo, kiam la aventuro finiĝis, ni gajnis smeraldon. Ĉu hodiaŭ ni gajnos diamanton?

— Diamanton ne, sed ĝian parencon. Ĉu enorde? — diris Lufimpu, ankaŭ per ŝerca tono, donante al ĉiu el ili krajonon, faritan el grafito, same kiel la diamanto.

— Kia originala ideo, Lufimpu, dankon! — komentis Hua. — Mi tuj uzos ĝin, por montri, kio venas en mian menson kiam mi pensas pri vi ĉiuj.



The illustration shows several hands holding blue pencils with yellow erasers and sharpened tips. The hands are positioned around a central area where text is written. The background is a light green color. The text is in a simple, black, sans-serif font.

Kaj, dirante tion, Hua desegnis sur paperfolio tion, kio estos, ekde tiu tago, la simbolo de la grupo, kiu restos kunigita kaj preta por novaj aventuroj, ie ajn en la planedo:

友 言 宜

Post la aventuro en Brazilo, kiam ili devis solvi la enigmon de “La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”, Andreo, Hua, Mavomo, Roza kaj Eriko renkontiĝas denove por klarigi novan misteron, nun en Antverpeno, Belgio. Du aliaj personoj kuniĝas kun ili: la knabino Klara kaj la juna diplomato Lufimpu.

En streĉa tago, ili havas malmultajn horojn por forkuri de danĝera bandito, liberigi senkulpan viron kaj ankoraŭ evitigi tragedion en hotelo, kie okazas grava kunsido de UN. Por tio, ili bezonas decifri mesaĝon pri la fama Blua Songo.